



BULONJA REKOMENDARO

*Alprenita en Boulogne-sur-Mer (Francio) la 29^{am} de Marto 2005
konklude de la internacia renkontiĝo Boulogne 2005 Esperanto.*

KVINCENT kvindek esperantistoj el 23 landoj kunvenis en Boulogne-sur-Mer de la 25^a ĝis la 30^a de Marto 2005, kadre de la internacia renkontiĝo *Boulogne 2005 Esperanto*, por memorfesti la centjariĝon de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905.

Konstatante la progreson de la internacia lingvo Esperanto dum la pasinta jarcento danke al la intensa laboro de la pioniroj kaj ties posteuloj ;

Konstatante la atingaĵojn de Esperanto sur la kampoj de kulturo, literaturo kaj internacia rilatado kaj ties kontribuon al la antaŭenigo de monda paco, aparte kadre de la oficialaj rilatoj inter UNESKO kaj la Universala Esperanto-Asocio ;

Ekzameninte, kiel siavice la nuna esperantistaro agadu por la estonteco ;

Ili rekomendas la jenajn celojn kaj strategiojn :

1. Daŭrigi kaj pliintensigi la agadojn sur la kampo de la internaciaj rilatoj inter individuoj, inter popoloj kaj inter regnoj, kaj de la rilatoj en internaciaj kaj transnaciaj organizaĵoj ;
2. Batali kontraŭ la danĝero de hegemonio kaj diskriminacio favorantaj iun nacian lingvon, cele al protektado de la diverseco kaj egalrajteco de la lingvoj kaj kulturoj, kadre de la rajtoj kaj devoj de la civitanoj rilate komunikadon ;
3. Persisti — rimarkante malfacilojn en la nuna lingva situacio de Eŭropa Unio — en la klopodoj alporti kontribuon al neŭtrala kaj nediskriminacia komunikado dum aranĝoj kaj en organizaĵoj multlingvaj ;
4. Kunagadi kun lingvodefendaj organizaĵoj kadre de la konstanta fundamenta celo al diverseco kaj egalrajteco ;
5. Utiligi Esperanton por plifaciligi kaj pliriĉigi la konon de la mondo pere de la interhomaj kontaktoj kaj turismo ;
6. Utiligi Esperanton por plifaciligi kaj pliriĉigi la rilatojn inter la ĝemeligitaj urboj kun ties civitanoj kaj inter la ĝemeligitaj universitatoj kun ties studentoj ;
7. Profiti ĉiujn novajn teknologiojn de informado kaj komunikado, aparte Interreton.